



Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto  
American Association of Esperanto Teachers

(Sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj)

(Branch of the International League of Esperantist Teachers)

Numero 177

ISSN: 0002-7499

junio 2008

## Enhavo

AAIE Matters	
Nia Jarkunsido en Montrealo.....	1
Kotizoj.....	1
Esperantaj Ekzamenoj en Montrealo.....	1
ILEI Matters.....	1
Instru-sugestoj.....	2
Esperanto-Instruado en la Reto.....	3
Jar-Raportoj de AAIE	
Prezidanto.....	4
Vicprezidanto.....	4
Kasisto.....	4
Koresponda Sekretario.....	4
Kalendaro.....	5
Reminder.....	5
Course Report Form.....	6
Membership Form.....	7
<b>Balotilo.....</b>	<b>8</b>

### Redaktoro

Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr.,  
Santa Barbara CA 93111-2521 USA  
<dorothyjean@gmail.com>

Vic-Prezidando / Bultena Formatisto  
D Gary Grady <dgarygrady@verizon.net>

Prezidanto  
Ron Glossop <rglossop@mindspring.com>

### Eduka Sekretario

Elizabeto (Beth) Magallon Dorcas  
<magallon@intellex.com>

Koresponda Sekretario  
Sally Lawton <slaw-o@crocker.com>

Kasisto  
Mary Napolitan <mjp@comcast.net>

## AATE Matters

### Nia Jarkunsido en Montrealo

Sabaton, la 12-an de julio, 2008, en la kadro de la Kongreso de Esperanto-USA en Montrealo, okazos la jarkunsido de AAIE en la ĉambro DS-1525 (kunvenejo Harlow). Ni diskutos la **estraranajn jar-raportojn**, kiujn vi povos legi antaŭe (vidu paĝon 4), kaj ni fin-voĉdonos pri kandidatoj por kasisto kaj eduka sekretario (vidu la **balotilon sur paĝo 8**).

**Viaj sugestoj pri aliaj diskutindaj temoj estas bonvenaj!** Bonvolu sendi ilin al nia prezidanto, Ron Glossop, ĉe <rglossop@mindspring.com> kiel eble plej frue.

### Kotizoj

Kiel anoncite en la aprila Bulteno, la kotizoj por esti membro de AAIE dum unu jaro estas \$40 por tiuj kiuj volas ricevi la *AAIE-Bultenon* kaj la *ILEI-Pedagogian Revuon* en papera formo per ordinara poŝto, kaj \$20 por ricevi la du publikajojn rete.

Dumviva membreco kostas \$800 papere, \$400 rete. Kaj monaj donacoj estas ĉiam bonvenaj! Sur paĝo 7 estas loko por indiki ĉiajn pagojn.

### Esperantaj Ekzamenoj en Montrealo

If you intend to take one of the U.S. Esperanto examinations (which are for English speakers only) in Montreal, please notify the administrator (Dorothy Holland <dorothyjeanh@gmail.com>; 805/967-5241) **no later than Thursday, July 10**, indicating which level you prefer (Basic, Intermediate, or Advanced). Each test takes approximately 2 hours, and the fee is \$10, payable when you come.

Se vi volas ekzameniĝi per la ekzamenoj de ILEI/UEA, kiuj estas tute en Esperanto (inkluzive la instrukciojn), bonvolu tuj anonci vin al Atilio Orellano Rojas per e-poŝto <lei001@tiscali.nl>. Estas du niveloj (Elementa kaj Meza); ĉiu konsistas el tri "staĝoj" (apartaj sesioj) kaj kostas \$40.20 por Usonanoj.

### ILEI Matters

La ĉijara Konferenco de ILEI okazos en Portonova, Benino, Afriko de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto (tuj post la UK en Roterdamo). La temo estas "Instruistoj de Esperanto por la Planedo Tero". Papera aliĝilo troviĝas en IPR 04/4 (paĝo 37). Aliĝilo estas ankaŭ havebla ĉe la jena reta adreso: <http://ilei.info/konferenco/alighilo208.php> Se vi havas demandojn, sugestojn, proponojn, skribu al la Estrarano pri Konferencoj Aida Cizikaite Kapiniu ĉe: <aidut@mail.lt>

La oficialaj reprezentantoj ("komitatanoj") de AAIE ĉe la ILEI-Konferenco estas Ron Glossop, Lucy Harmon, kaj Sally Lawton. Kaj, ĉar pli ol 50 AAIE-membroj estas membroj ankaŭ de ILEI, ni rajtas havi kvaran komitatanon, sed ĝis nun ne trovis tion.

En la lasta numero de *Internacia Pedagogia Revuo* (08/2)\* troviĝas multaj interesaj eroj, inkluzive la jenajn:

- Kiel Organizati Lingvan Festivalon (p. 7-15)
- Lerneja Malbonfarto: Kiu igis la finan 18-jarulon murdisto? (p. 21-22)

\*Se vi pagis vian AAIE-kotizon por la jaro 2008, vi rajtas ricevi la *Internacian Pedagogian Revuon*. Se vi ne ricevis numeron 08/2, bonvolu informi la redaktorinon.

## Instru-sugestoj

The following is from a recent exchange between Ron Glossop and Allan Boschen regarding the use of the Esperanto word kiu:

*Allan wrote:*

"Kiu vi estas?" (in my book) = "Which (person) are you?", where the parentheses means "implied", i.e. the word "persono" is implied. To spell it out in E-o, it would be better as "Kiu (persono) vi estas. Better everyday English is that "Which person" = "Who"... In "Kiu persono", as in "Kiu lando", we see that "Kiu" functions as an adjective. When kiu assumes the 'persono' into itself, it becomes a pronoun.

So, I would summarize this to the effect that when we throw the 'persono' / 'person' in for explanation, we have only done what I would call, a 'half-translation'. You haven't completed the translation until you have it in everyday terms. Then "Kiu vi estas?" = "Who are you?" and "El kiu lando vi estas?" = "From which land are you?" not "From which individual land are you?"

*Ron replied:*

It is a fundamental error to believe that the Esperanto word "kiu" always refers to persons and thus should be translated "who." Would it ever be correct to translate "El kiu lando vi estas?" as "Out of who land are you?"

The correct translation for the Esperanto word "kiu" into English is "which individual." Even in English, when we say "which individual" it often implies or suggests that it is a person, but it doesn't say that it is a person.

The word "kiu" can be an adjective as well as a noun, as is evident in the sentence "El kiu lando vi estas?" That is but one example. What is the correct translation of "Kiu libro estas sur la tablo?"? Would it be correct to translate that as "Who book is on the table?" It has nothing to do with a person. The correct translation is "Which individual book is on the table?"

The distinction between "kiu" and "kio" is not that the former refers to persons and the latter to things. The distinction is that "kiu" refers to an individual (a person, an animal, or a thing which can have a proper name or a definite description which applies only to that individual) while "kio" (like any common noun) refers to a class of nouns. When someone asks, "Kio vi estas?" there are many common nouns which can provide possible answers. "Mi estas homo." "Mi estas patro." "Mi estas instruisto." "Mi estas inĝeniero." But all those answers are common nouns, not proper nouns. (Note that "Kio estas vi?" often is taken to be a request for one's occupation, but that is not part of the definition of "kio." One can ask "Kio estas tiu objekto sur la tablo?" Here there is no request for an occupation but only for a common noun.)

"Kiu vi estas?" is a request for a proper noun or a definite description. If someone asks, "Kiu vi estas?" a proper answer may be "Mi estas la plej aĝa homo en la ĉambro." "Which individual are you?" "I am the oldest human being in the room." Only one individual fits that description, which is why it is called a definite description.

"Kiu rivero estas orienten de Sankta Luiso?" La rivero kiu estas orienten de Sankta Luiso estas la Misisipo." Note that here the

word "kiu" has nothing to do with persons! "Kiu monto estas la plej alta en la mondo?" That is, "Which individual mountain is the highest in the world?" Again, the word "kiu" has nothing to do with persons. Note that one could also ask that question this way: "Kiu estas la plej alta monto en la mondo?" That is, "Which individual is the tallest mountain in the world?" Now "kiu" is a noun rather than an adjective as in the former form of the question, but it still means "which individual". It is a request for a proper noun or a definite description and has nothing to do with a person or persons.

Note that one uses the relative pronoun "kiu" even when speaking of objects rather than persons. For example, "La libro en mia mano estas la libro kiu estis sur la tablo hieraŭ." Translation: "The book in my hand is the book, which individual was on the table yesterday." It also works with the plural form. "Donu al mi la librojn kiuj estis sur la tablo hieraŭ." That is "Give to me the books which individuals were on the table yesterday." Persons who think that "kiuj" only refers to persons will be unable to translate this sentence.

"El kiu lando vi estas?" = "From which land are you?" and more precisely "From which individual land are you?" It is a request for a proper noun or definite description which applies to only one land (for example, the most powerful land in North America). The word "kiu" most definitely is not a request for a person! In this case, it will be obviously completely wrong to translate "kiu" as "who." We do a great disservice to our students if we teach them that "kiu" means "who" instead of "which individual."

I am aware that there are some books which say that "kiu" should be translated "who," but that is the very reason that I feel so strongly that this misunderstanding needs to be corrected. It only confuses students when they come to sentences where "kiu" cannot be translated "who." On the other hand, they will always be able to translate "kiu" as "which individual" and "kiuj" as "which individuals."

Also "ĉiuj" always means "all individuals" and does not necessarily refer to persons (though it could). For example, "Ĉiuj domoj en tiu parto de la urbo havas altaj prezoj" = "All houses in that individual part of the town have high prices."

In conclusion, "kiu" = "which individual," "tiu" = "that individual," "iu" = "some indefinite individual," "ĉiu" = "each individual," and "neniu" = "no individual." All these "-iu" correlatives can also be plural. But "kio," "tio," "io," "ĉio," and "nenio" cannot have a plural form any more than one can have "everything" or "nothing" in English. If you want a plural, use the "-iuj" words, such as "tiuj" = "those individuals" and "iuj" = "some individuals."

*Don Houpe, kiu instruas Esperanton ĉe la North Carolina School for Science and Mathematics in Durham, skribis jene pri kiel li traktas prononc-erarojn:*

"Jen la sistemo - Unue la lernantoj laŭtlegas unu el la aliaj facilaj tekstoj; ekzemple, la dialogojn el 'Jen Nia Mondo'. Due, ili individue laŭtlegas la saman dialogon al la grupo kaj al mi. Se li/ŝi misprononcas vorton, mi prononcas ĝin ĝuste kaj la lernanto ripetas. Poste, ni uzas pli riĉajn tekstojn en la sama maniero,

ekzemple, rakontojn verkitajn de Claude Piron kaj de Sandor Bako en ‘La Kisa Malsano’. Mi aparte ŝatas la rakonton de Bako, “Strato de foresitaj Songoj”, por kompreno, ĝuo kaj prononcado.

“Sekve, ni uzas la tekston de “Artamaj Astronomoj” de edukado.net. Ili unue aŭskultas ĝin en la lingva laboratorio kaj tie ekzercas sin per la teksto. Ili ankaŭ faras skribitajn ekzercojn pri la teksto, de edukado.net, kaj de mi. Du-tri tagojn poste ĉiu lernanto private laŭlegas alineon (de Artamaj Astronomoj) elektitan de mi. Mi substrekas la misprononcitajn vortojn en kopio de la teksto. Fakte, en ĉi tiu taksado, misprononco estas malofa.”

*From an out-of-print booklet entitled False Friends by M. C. Butler:*

“The language student will often find that two languages have a root in common. But this does not always mean that the root has the same meaning in both languages. The similarity may indeed be purely coincidental. E.G., Esperanto **akso**, **bet**o and English *axe*, *bet*. But even when two words are definitely related, they often do not cover the same range of meaning... Here are some Esperanto and English roots similar in appearance, but not identical in meaning:

**Adepto**, adherent, initiate. *Adept*, lertulo...”

There follows almost 3 pages of examples, with English definitions. Here are the Esperanto/English pairs without definitions. They could be used as a quiz, or contest, or homework, or a guide for instruction—whatever fits into your teaching style:

Adulto/*adult*; afekti/*affect*; agonio/*agony*; aktuala/*actual*; akurata/*accurate*; alarmo/*alarm*; apologio/*apology*; arbitra/*arbitration*; atendi/*attend*; atlaso/*atlas*; averti/*avert*; balanci/*balance*; bedo/*bed*; benzino/*benzine*; beto/*bet*; bordo/*board*; brava!

*brave*; brovo/*brow*; buklo/*buckle*; dedukti/*deduct*; demandi/*demand*; digo/*dig*; domaĝi/*damage*; dragono/*dragon*; dresi/*dress*; drinki/*drink*; drivi/*drive*; efektiva/*effective*; eventuala/*eventual*; fatala/*fatal*; favorata/*favorite*; festo/*feast*; foldo/*fold*; frazo/*phrase*; fundo/*fund*; gipso/*gipsy*; granda/*grand*; guvernio/*govern*; ĝenerala/*general*; ĝentila/*gentle*; ĝusta/*just*; imponi/*impose*; indulgi/*indulge*; infano/*infant*; instanco/*instance*; insulti/*insult*; invalida/*invalid*; ĵurnalo/*journal*; kapo/*cap*; kardo/*card*; karto/*cart*...

(Aperos pli da ekzemploj en nia septembra numero...)

*The following is from an excellent article entitled Misteaks which appeared in esperanto-usa 2008/3 and was written by AATE vice-president D. Gary Grady:*

“...fear of mistakes gets in the way of learning and speaking, and this is an important point to keep in mind when teaching (or learning) a language.

An older school of language instruction demanded good pronunciation, grammar, and usage right from the start, on the theory that this saved having to un-learn bad habits later. Today the emphasis has shifted toward the ability to communicate, since that’s a more urgent real-world need, and experience has shown that those supposed bad habits aren’t so hard to shake after all...

But some lingering nervousness may still be a problem for many of us, and anyone teaching a more formal class needs to keep in mind the need to help students get over their fear of making mistakes. One of the oldest classroom techniques for accomplishing this, especially when teaching beginners or large groups, is to let students respond en masse...”

## Esperanto-Instruado en la Reto

Thanks to Gary Grady, AATE now has a web link at <http://aaie.us>. The content will expand during the coming months.

Ĉu vi aŭdis pri la nova senpaga televid-konferenca servo nomata ooVoo? Kvankam li mem ne provis ĝin, Gary Grady trovis la jenajn recenzojn pri ĝi:

<http://klessblog.blogspot.com/2008/02/robin-goods-oofoo-review.html>

[http://www.masternewmedia.org/news/2008/02/21/video\\_conferencing\\_as\\_it\\_should.htm](http://www.masternewmedia.org/news/2008/02/21/video_conferencing_as_it_should.htm)

Kaj li sumigis la enhavon jene:

“Mallonge: ‘ooVoo’ estas senpaga servo, uzebla per Vindoza aŭ Makintoŝa komputilo, kiu permas al vi samtempe konversacii voĉe *kaj vide* kun ĝis kvin aliaj homoj samtempe. Do entute ses homoj povas partopreni de ie ajn en la mondo. Necesas havi sufiĉe rapidan retaliron (DSL-an aŭ kablano), komputilon, retkameraon, kaj (prefereble) surkapan telefonon (‘headset’).

“La plejmulto da lastatempaj Makintoŝoj jam enhavas retkameraon (‘webcam’), kaj oni povas aĉeti apartan retkameraon kontraŭ proksimume \$30. Kaptelefono ‘headset’ kostas \$15-80, meze \$35-40.

“Do jen maniero konduki Esperanto-kurson por malgranda grupo. Ĉiuj povas vidi unu la alian, do eblas instrui skribadon, montri objektojn (‘kio estas ĉi tio?’), ktp...

“Jen la retejo de uVoo mem: <http://www.oovoo.com>

“Similan servon ofertas aliaj firmaoj, sed kun limoj.

Ekzemple Skype (almenaŭ ĉi-momente) permesas samspecan konversacion inter nur du homoj, kaj iChat de Apple (laŭ mia kompreno) funkcias sole en Makintoŝaj komputiloj.”

AATE member Enrique Ellemberg’s website <http://esperantofre.com/eroj/ilo01a.htm> is an excellent source of advice on Steps for learning and using Esperanto. Here are the titles of subjects he covers:

- 1) The best way to learn
- 2) Basic courses (in English)
- 3) Advanced course books (in Esperanto)
- 4) More advanced courses and books
- 5) Listen and watch: Internet radio, videos, cassettes
- 6) Read Esperanto magazines
- 7) Write in Esperanto, get some pen pals
- 8) Visit newsgroups, lists
- 9) Speak Esperanto at home
- 10) Speak Esperanto with people in other countries
- 11) Meetings
- 12) Meetings for young people (to age 30)
- 13) Passport Service”
- 14) Useful addresses

## Jar-raportoj de la AAIE

### Raporto de la Prezidanto

En Julio 2007 mi ĉeestis la Universalan Kongreson de Esperanto en Jokohamo, Japanio kaj la ILEI-konferencon en Ranzan, Japanio. Dum la UK mi helpis ILEI-estraranon Mihai Trifoi konduki la programon por la “Tago de la Lernejo.” Dum la ILEI-konferenco mi kune kun Lusi Harmon kaj Mar Kardenas reprezentis AAIE.

Dum la aŭtuno unufojon semajne mi instruis Esperantan klason ĉe la CBC (Christian Brothers College), privata katolika dua-grada lernejo iom okcidenten de la urbo Sankta-Luiso. En Oktobro mi ĉeestis la Autunan Renkontiĝon de Esperanto ĉe Lago Georgo en Novjorkio kaj instruis la klason por komencantoj.

Dum la printempo mi instruis klason de gejunuloj je dimanĉoj ĉe la Unitariana Preĝejo en Alton, Ilinojso. Bedaŭrinde, pro diversaj aliaj aferoj, la klaso kunvenis nur unu fojon monate anstataŭ semajne kiel oni planis. Tamen mi kunlaboris perrete kun instruistoj de Esperanto en ok landoj (Benino, Britio, Brazilo, Bulgario, Italio, Madagaskaro, Togolando, kaj Usono) pri proponata projekto de kulturo interŝanĝo kiun la Eduka Komisiono de la Eŭropa Unio eble subvencius. Bedaŭrinde, nia propono ne estis aprobata, sed eble ni penos denove dum la venonta jaro.

Dum la lasta semajno de Junio mi kunlaboris kun kvin aliaj Esperantistoj por aranĝi budon pri Esperanto ĉe la jara Ĝenerala Asembleo de la Unitarian-Universalista Eklezio en Fort Lauderdale, Florido. Tie mi ankaŭ parolis kun gejunuloj pri Esperanto kaj ĝia ligo al Mondeĉivitaneco.

Dum la jaro kiel Direktoro de Infanoj chirkaŭ la Mondo mi multe korespondis kun instruistoj en Afriko kaj sendis instru-materialojn al ili. Fine mi aĉetis komputilon por Latifou GBADAMASSI kiu instruas multajn infanojn kaj gejunulojn en Benino. Mi faris tion anstataŭ ĉeesti la ILEI-konferencon en Benino. Mi pensas ke la komputilo helpas lin pli ol mia ĉeesto ĉe la ILEI-konferenco.

Lastatempe mi estris la AAIE-Kandidatigan Komitaton.

Por nia jarkunsido en Montrealo mi opinias ke ni devus diskuti ideojn pri kiel kaj kie ni instruistoj de Esperanto povas trovi lernantojn kaj kiel ni pli bone povus uzi la retejon por allogi lernantojn. Mar Kardenas nun multe laboras en Meksikio, do eble ni devus plani konferencojn por instruistoj kaj lernantoj apud la landlimo kie la homoj ne parolas la saman lingvon.

Sincere,  
Ron Glossop

### Raporto de la Vicprezidanto

Dum la pasintaj 12 monatoj mi ...

- Agis kiel formatisto de la Bulteno de AAIE kaj verkis kelkajn mallongajn artikolojn por ĝi;
- Verkis AAIE-rubrikon en ĉiu numero de Esperanto USA ekde la komenco de 2008;
- Starigis komencon de nova retejo ĉe aaie.us;

• Partoprenis diskutojn de la estraro de AAIE.

—D Gary Grady

### Raporto de la Kasisto

**SALDO je 6-30-2007**                      **\$1996.02**

**Enspezoj**  
Kotizoj                                      **2285.00**

**Elspezoj**  
ILEI                                          1227.25\*  
Bulteno                                      223.52\*\*  
Entute                                        **1450.77**

**SALDO je 6-30-2008**                      **\$2830.25**

—Mary Napolitan

### Notoj de la redaktoro

\* Por membreco en ILEI: Pago por 44 AAIE-membroj po 18 eŭroj kaj por 6 membroj po 4 eŭroj, plus servo-kosto de 20.4 eŭroj por transsendi la monon

\*\* Elspezoj de la Redaktoro de la *Bulteno* (por printigo kaj poŝto; variis laŭ la nombro da paĝoj)

Junio 2007 (B-173)	49.98
Septembro 2007 (B-174)	74.28
Januaro 2008 (B-175)	47.06
Aprilo 2008 (B-176)	52.20
Entute:	\$223.52

Apartan dankon meritas D. Gary Grady, kiu tiel lerte formatas la *Bulteno*-n!

—Doroteo Holland, Redaktoro de la AAIE-*Bulteno*

### Raporto de la Koresponda Sekretario

Ĝis hodiaŭ, la unuan de julio, 2008, mi ricevis por la nuna jaro 19 reaniĝajn kotizojn kaj unu novan. Kaj estas 18 Dum Vivaj membroj. 12 membroj de 2007 ne reaniĝis sed mi atendas ke plejparte ili sendos monon aŭ pagos ĉe Montrealo. Eble la ekonomio influas la membrojn tiurilate. Sed mi spertis dum jaroj ke la tempo de pago ĉiam estis dise dum la jaro. Dum multaj jaroj la plej granda pago okazis dum la someraj kunvenoj. Sed tiu politiko estis ŝanĝita antaŭ eble ok jaroj al kalendara jaro. Neniam estis tute sukcesa ĝis lastjare kiam ĉiuj pagis tre frue.

Lastatempe mi legis en Esperanto-USA ke la oficejo ekde nun datus E-USA membrecon ekde la tempo kiam alvenos la pagon, do kiamajn dum la jaro ĝis la sama dato en la sekva jaro. Certe ankaŭ AAIE akceptas novajn membrojn dum la tuta jaro, sed kio okazas ĉe AAIE estas ke la novulo ricevas la antaŭajn bultenojn de la jaro. Eble bona solvo sed ne ĉiu

novulo vere ŝatas tiun solvon. Kaj li ŝuldas refoje je la sekva januaro.

La listo de membroj sekvas kaj mi ankaŭ notas kiam la DV membroj laste pagis. La plej malnovaj DV pagis \$100 sed la sumo estis altigita poste eble trifoje. Aronson, Boschen DV 03, Brozovsky, Casey, Charters DV 08, Cook DV 91, Dorcas DV 02, Eddy DV 03, Ellemberg, Firooznia \*, Glossop DV 08, Goldberg DV 08, Grady, Harmon, Harris, Holland,

Houpe DV 06, Jordan DV 94, Keeble, Knudsen DV 02, Lawton, Lieberman DV 06, Magallon, Massey DV 80, Napolitan, Nuessel, Parlan DV 89, Prystupa, Rish DV 81, Roff DV 99, Rusch DV 07, Saghafian, Studer, Torres, Van Tuyl, Victor, Wheeler DV 91, Williger DV 94  
Aprile mi ricevis \$50 donacon de June Knudsen.

—Sally Lawton

## Kalendaro

### Julio 2008

11-14: 56-a ELNA (Esperanto-USA) kongreso — Montrealo, Kanado ([www.esperanto-usa.org](http://www.esperanto-usa.org); [elna@esperanto-usa.org](mailto:elna@esperanto-usa.org)) Inkluzivos la jar-kunsidon de AAIE kaj Esperanto-ekzamenojn por anglalingvanoj.

12-18: 7-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto — Montrealo, Kanado ([www.take7.ca](http://www.take7.ca); [informo@take7.ca](mailto:informo@take7.ca)) Temo: Ekosistemoj, lingvoj, kulturoj: Diverseco por daŭripova evoluigo en la Amerikoj.

19-26: 23-a Universala Kongreso de Esperanto — Roterdamo, Nederlando. La 100-a jubileo de la fondiĝo de UEA. Temo: “Lingvoj: trezoro de la homaro”+

19-26: 39a Internacia Infana Kongreseto — Oostvoorne, Nederlando (40 km oriente de Roterdamo)

29-05 *aŭgusto*: 41a Konferenco de ILEI - Portonovo, Benino, Afriko (Atilio Orellana Rojas,

[atilioorellanarojas@gmail.com](mailto:atilioorellanarojas@gmail.com) aŭ [ilei.info/konferenco/](http://ilei.info/konferenco/)) — Vidu paĝon \_\_\_\_.

### Oktobro 2008

2-5: Tutlanda Oktobra Renkokntiĝo Pedagogia (TORPEDo-3) Herzberg, Germanio. Novtipaj ekzamenoj laŭ la Referenckadro en Niveloj A-B-C, postularo, modeltestoj, trejnado de ekzamenantoj - estos unu el la ĉeftemoj. (ICH <[esperanto-zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de)>)

### Julie (?) 2009

94a UK en Bjalistoko, Pollando, ĉe la Teknika Universitato. Honore de la 150a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof.+

+UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ, Rotterdam, Nederlando; [uea@inter.nl.net](mailto:uea@inter.nl.net); [uea.org](http://uea.org)

Aktuala listo de E-aranĝoj daŭre konsultebblas ĉe [www.eventoj.hu/kalendar](http://www.eventoj.hu/kalendar)

## Reminder

This is YOUR Bulletin! Please send to the editor\*:

... Your ideas, questions, comments about teaching Esperanto;

...What Esperanto text-books, videos, teaching methods and/or techniques, etc. you find most useful;

...Requests for teaching advice

\*S-ino Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara CA 93111-2521, Telefono: (805) 967-5241. E-poŝto: <[dorothyjeanh@gmail.com](mailto:dorothyjeanh@gmail.com)>

# American Association of Teachers of Esperanto

## COURSE REPORT FORM

### INSTRUCTOR

Name Address \_\_\_\_\_  
Email address \_\_\_\_\_

### COURSE

Location \_\_\_\_\_  
Tuition cost \_\_\_\_\_  
Level: Elementary \_\_\_\_\_ Intermediate \_\_\_\_\_ Other \_\_\_\_\_  
Beginning and ending dates \_\_\_\_\_  
Number of lessons \_\_\_\_\_ Duration of each lesson \_\_\_\_\_  
Material used: Books \_\_\_\_\_  
Videos \_\_\_\_\_  
Other \_\_\_\_\_

### STUDENTS

Number finishing course \_\_\_\_\_ Age range \_\_\_\_\_  
Previous language skills \_\_\_\_\_  
Is the course shown in the student records? \_\_\_\_\_  
Was an AATE exam administered? \_\_\_\_\_

### FORMATION OF CLASS

Name of organizer \_\_\_\_\_  
Publicity method used \_\_\_\_\_  
Supplier of course materials \_\_\_\_\_

### COMMENTS OF INSTRUCTOR

Concerning publicity  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

Concerning materials  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

Concerning teaching  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

Please return this form to:  
Elizabeto Dorcas  
900 Country Club Lane  
Fort Worth, Texas 76112

E-mail: <magallon@intellex.com>

# American Association of Teachers of Esperanto

## MEMBERSHIP FORM

Voting members consist of professional educators (either active or retired) who are interested in Esperanto, and non-professionals who teach, have taught, or intend to teach Esperanto.

NAME \_\_\_\_\_ PHONE (\_\_\_\_) \_\_\_\_\_

ADDRESS \_\_\_\_\_

CITY, STATE \_\_\_\_\_ ZIP \_\_\_\_\_

E-MAIL ADDRESS \_\_\_\_\_

I do not want the following information to appear in the AATE membership list:

My telephone number  My e-mail address  Other \_\_\_\_\_

NAME & ADDRESS OF SCHOOL \_\_\_\_\_

Are you a professional educator?  Yes, active  Yes, retired  No

Annual dues are \$40. Memberships are for the calendar year. If you join in the middle of the year, you will receive "Bulletins" previously distributed during that year. All AATE members are automatically members of the International League of Teachers of Esperanto (Internacia Ligo de Instruistoj de Esperanto) and receive their quarterly *Internacia Pedagogia Revuo*.

If you wish to receive AATE's Bulletin and ILEI's *Internacia Pedagogia Revuo* electronically, instead of via regular mail, the annual dues are \$20. Please indicate here: \_\_\_\_\_

Life Membership \$800 \_\_\_\_\_ with subscriptions by mail      \$400 \_\_\_\_\_ with electronic subscriptions

What year is this membership for? 20\_\_\_\_      \_\_\_\_\_ New  Renewal Today's date: \_\_\_\_\_

I wish to give \$ \_\_\_\_\_ as a donation to AATE.

Make your check payable to "American Association of Teachers of Esperanto" or "AATE" and mail it with this form to Sally Lawton, 12 Stage Road, Westhampton, MA 01027

## BALOTILO

1. Vote for one candidate for each office.
2. Put your completed ballot in a small unmarked envelope.
3. Put the unmarked envelope in a larger one showing your name and return address. On the outside of the large envelope write BALOTILO.
4. Mail your completed ballot to D. Holland, 5140 San Lorenzo Drive, Santa Barbara CA 93111-2521 so that it will reach her no later than July 10, 2008. Or bring it to the AATE annual meeting in Montreal.

Por Kasisto (2-jara deĵoro de julio 2008 ĝis julio 2010):

Mary Napolitan \_\_\_\_\_

\_\_\_\_\_ \*

Por Eduka Sekretario: (2-jara deĵoro de julio 2008 ĝis julio 2010)

Elizabeto Dorcas \_\_\_\_\_

\_\_\_\_\_ \*

\*Write-in candidates must present written confirmation that they are willing to run.